

# NIA PONTO

Grupo Esperantista

Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre

48005-BILBAO (Hispanio)

Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (jesusmiguel.garcia@ehu.es)

TTT-ejo: [esperantobilbao.tk](mailto:esperantobilbao.tk)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)

☎ 619.694.683 (Iciar)

☎ 658.709.087 (Jesús)

💻 [esperantobi@gmail.com](mailto:esperantobi@gmail.com)

**Jar-kotizoj:** Normala: 30 €. Speciala: 15 €. Familia: 45 €.

**BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550**

**MARTO/APRIL 2013**

**Nro. 95 (2/13)**



**100-jaroj, 81 kiel esperantisto**

## **EDUARDO LARROUY 100-JARA**

La pasintan 23-an de marto, 43 homoj atentis pri la alvoko farita de la E-Grupo de Bilbao kaj veturis al nia urbo por omaĝi al nia kara kaj kortuŝa amiko Eduardo Larrouy.

Kiam la afero komencis svarmi en niaj kapoj, ni kalkulis je malgranda rondo de plej proksimaj amikoj sed la afero kreskis kiel neĝobulo kaj fine ni devis prilabori kvazaŭ etan kongreson.

Al Bilbao flugis unu homo el Bulgario kaj du el Belgio; tri veturis el Valjadolido, du el Zaragozo kaj unu el Madrido; alia el Pampeluno kaj kelkaj el diversaj urbetoj de Gipuzko kaj Alavo. Alie, al la rondo aliĝis diversaj homoj, ekseperantistoj, kiuj malofte vizitas la E-Grupon sed tamen deziris partopreni la omaĝon al tiu homo, kiun konis pluraj generacioj de bilbaoaj Grup-anoj. Tiuj homoj tre emociige travivis la eblon sidi denove apud konatuloj de junecaj aventuroj, vojaĝoj, planoj kaj E-agadoj.

Antaŭ ol la komuna manĝo, oni okazigis "interkonan tagmezon" ĉe la sidejo de la E-Grupo; viglaj interparoladoj en ege amika etoso okazigis preskaŭan forpuŝon de ili ĉiuj por atingi la restoracion je la antaŭinterkonsentita horo.

Jam surstrate, trankvile ni promenis, tra la mallarĝaj stratoj de la malnova kvartalo de Bilbao, ĝis la restoracio "Bikandi", kiu situas en unu el la plej famaj kaj tipaj stratoj de tiu kvartalo: la strato "Somera".

Post la manĝo, dum ni gustumis kafon kaj alkoholaĵon, alvenis la momento plej emociiga: la donacoj al Eduardo kaj la paroladoj de kelkaj ĉeestantoj. Estis multaj donacoj, tre diversaj. La E-Grupo de Bilbao donacis belan gratulsildon enhavanta okulfrapan verdan stelon; paro de Grup-anoj, kiuj ne povis ĉeesti la kunvenon, sendis ĉarman foton el kiu ili ambaŭ transdonis sentoplenajn kisojn al Eduardo; ne mankis



saketo enhavanta rozparfumojn el Bulgario, kiun alportis kaj donacis Antoaneta Nikolaeva pere de entuziasmigaj vortoj kaj salutoj el prezidanto de Bulgara E-Asocio; ankaŭ estis diversaj gratulafiŝoj, ktp.

Aparte substrekindaj estas la diversaj retmesaĝoj ricevitaj el la tuta mondo: la Prezidanto de UEA, Probal Dasgupta; ĝia ĝenerala sekretario, Osmo Buller; ĝia

eksprezidanto, Renato Corsetti; kaj multaj aliaj esperantistoj, ne tiel konataj en Esperantio sed same gravaj por Eduardo; al ĉiuj li respondos persone, iompostiome.

En tiu evento, kompreneble, ankaŭ ne mankis gratulletero de nia kara kaj proksima amiko Tonjo del Barrio, Prezidanto de HEF, kies vortoj estis longe aplaŭdataj de la tuta ĉeestantaro. Pro familiaj kialoj, spite de lia deziro, Tonjo ne povis persone akompani nin.

Kaj ankaŭ estis tempo por poezio: la bilbaoa E-poeto Alberto García Orive skribis belan poemon al Eduardo, kiun lerte deklamis nia portugala amiko Paŭlo Branco.

Fine, kvankam li mem no povis veturi al Bilbao, Antonio Marco Botella sendis leteron al sia bona amiko Eduardo, laŭte legata de tiu bonkora kaj modesta homo, kiu estas Lorenzo Noguero.

Post tiom da kortuŝaj kaj emociigaj okazintaĵoj, Eduardo havis ankoraŭ fortojn



por danki al ĉiuj ilian alvenon kaj entuziasme paroli pri la avantaĝoj de Esperanto kiel kunigilo de tiom da amikoj liaj kaj, kompreneble, kiel internacia neŭtrala lingvo.

Je la fino, estis tiom granda bedaŭro pro adiaŭo ke multaj homoj proponis denove renkontiĝi venontjare por festi la 101-jariĝo de Eduardo.

Dankon, Eduardo, pro tiuj agrabaj momentoj, la nunaj kaj la pasintaj. Pro ili nur, ni sentis ke ni ne eraris kiam iam ni faris la unuan paŝon por lerni Esperanton. La E-Grupo de Bilbao.

*(Artikolo aperinta en "Boletín" de HEF)*

## **Eduardo Larrouy en la amaskomunikiloj.**

### **Ĵurnaloj.**

17 mar. "El Correo". Foto kun familianoj.

18 mar. "Deia". Intervjuo.

Aprilo. Monata ĵurnalo "Bilbao". Intervjuo.

### **Radioj.**

26 feb. "Radio Popular". Bilbao.

06 mar. "Radio COPE". Bilbao.

11 mar. "Radio Haro" (Cadena S.E.R.-La Rioja)

### DANKON, DANKON KAJ DANKON

- Al la Membroj el nia Bilbaoa Esperanto-Grupo kiuj, okaze de mia centjareco, decidis aranĝi, plensukcese, kunvenon, por samtempe reliefigi mian 80an jaran Grupan membrecon, kaj dediĉon al la disvolviĝo de Esperanto, kun donaco de ĉi tiu bela plato, enhavante amikajn vortojn.



Al niaj ceteraj amikoj, kiuj devis vojaĝi por ĉeesti persone kaj varmigi nian etoson, ek de Portugalio, Brazilo, Bulgario, Litovio kaj Sirio, kun reprezentantoj de aliaj naciaj Grupoj, kiuj alportis trafajn memorigajn regalojn.

Permesu al mi, ke ĉe nunaj momentoj, mi min konsideru kiel virtuala reprezentanto de nia forpasinta Membraro, kiu forte laboris entuziasme, ek de 1906\*, kaj dediĉu niajn pensojn kaj dankon al ili.

Bilbao, 23/03/2013

## COMIDA DE ANIVERSARIO DEL GRUPO.

Como ya comienza a ser tradición, el **sábado 18 de Mayo** celebraremos una comida para festejar el aniversario de la creación del Grupo (el 20 de Mayo hará 107 años). Estáis todos invitados, aunque deberéis **llamar, con antelación**, a cualquiera de los teléfonos que tenéis en la cabecera de esta circular.

La comida tendrá lugar en el restaurante “Adrián”, de Repélega-Portugalete (metro: Abatzolo). Menú del día: 13,50 €. Familiares, amigos y simpatizantes también son, naturalmente, bienvenidos.

## ASAMBLEA GENERAL ANUAL.

Por la presente, y según exigen sus estatutos, se convoca la asamblea general ordinaria del Grupo Esperantista de Bilbao para el próximo **viernes 17 de mayo, a las 19,30 h.**, en su sede de Barrencalle Barrena, 7-1º dcha., con el siguiente

### **Orden del día:**

1. Lectura y aprobación, si procede, del acta de la asamblea general anterior.
2. Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos del año 2012.
3. Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2013.
4. Informaciones varias.
5. Ruegos y preguntas.

## ĜENERALA JARKUNVENO.

Tiel kiel vi povas legi ĉi-supre, la **vendredon 17-an de majo, je la 19,30 h.**, oni okazigos la ĉiujaran ĉiesan kunvenon. Ni ne bezonas substreki ke la partopreno de vi ĉiuj en la decidotaj aferoj, kiuj tuŝas nian Grupon, estas ege grava.

## **KONGRESOJ, RENKONTIĜOJ, ...**

(Rigardu: <http://www.eventoj.hu/>)

3-5 majo 2013. 72-a Hispana Kongreso. Zaragoza. Informejo: <http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso>

21-23 jun.2013. Valencia Kongreso. En Oliva.

20-27 julio 2013. 98-a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík, Islando.

28 jul/04 aŭg 2013. SAT-kongreso. Madrido.  
<http://satesperanto.org/-2013-86-madrid-.html>

03-10 aŭg. 2013. 80-a kongreso de Itala E-Federacio. Sanremo-Castelaro.  
<http://kongreso.esperanto.it>



## Filmoj en Esperanto en muzeo de Vitoria.

La muzeo Artium, de Vitorio, organizis filman festivalon, dediĉitan al lingvoj, por akompani ekspozicion de roterdama artisto Katarina Zdjelar. En ĝi oni elsendos tri filmojn kun rilato al Esperanto, venontan semajnfino.

(Toño del Barrio. 04/03/2013)

# Ekspozicio "La lengua como liberación: el esperanto" en Orereta (Gipusko).

La loka Federacio de la ĜKL(CGT) kun la subteno de la urbeŝtraro malfermis en Xenpelar Etxea de Orereta la ekspozicion "La lengua como liberación: el esperanto" inter la 19-a kaj la 27-a de marto.

Kiel aldona publika aktivaĵo, la 21-an Josu Herrarte prelegis ĉe la ekspoziciejo pri la Internacia Lingvo. La parolinto prelegis eŭske kaj kastilie, ĉar fakte temis pri du memstaraj prelegoj en ambaŭ lingvoj, pri la kialo, historio, gramatiko kaj cetero de Esperanto.

Inter la ĉeestinta publiko, plejparte engaĝitaj laboristoj kaj sindikatoj, montriĝis intereso por grupiĝi cele lerni la lingvon.

*Reportis: Nikolas Xil Carvalho.*



*Momento de la prelego surfone de la ekspozicio. Maldekstre, Josu Herrarte.*



Afiŝo de la ekspozicio kaj artikolo en la ĵurnalo "Diario Vasco". *Sendis: Josu Herrarte.*





## **Marteno Bustín forpasis.**

Laŭ informis la Sindikato el Alakanto de CNT-ILA, Marteno Bustín forpasis hieraŭ en Parizo, li devis vojaĝi tien pro kelkaj malsanoj.

*(Pedro Azpeitia. 22/03/2013)*

## **Bitoteko en Europeana.**

La Bitoteko de HEF aperas jam en Europeana, la eŭropunia projekto por krei publikan eŭropan bitotekon konsistantan el bibliotekaj, muzeaj kaj arĥivaj dokumentoj por doni aliron al la kultura kaj scienca eŭropa heredaĵo.

Vidu pliajn detalojn en:

<http://www.esperanto.es/hef/index.php/komenco/33-noticias-esperanto/noticia/206-europeanaeo>

kaj ekzemplojn en:

<http://www.europeana.eu/portal/search.html?query=esperanto>

Estas tute juste reliefigi kaj danki la laboron de la skipo kiu atingis tiun ĉi gravegan mejloŝtonon, kaj, kvankam pluraj aliaj amikoj kunlaboris, necesas malferme citi la nomojn de Ana Manero, Miguel Ángel Sancho, Juan Trenado kaj Manolo Parra. Ili multe kaj trafe klopodis por tiu atingo, kiu certe levos la bildon de Esperanto kaj specife de HEF en la ĝeneralaj kulturaj medioj.

*(José Antonio del Barrio, Prezidanto de HEF. 19/03/2013)*

## **TRA LA MONDO ...**

### **PLI OL 3500 ŜATANTOJ DE UEA EN FACEBOOK.**

La nombro de ŝatantoj de la paĝo de UEA en la retejo Facebook ("Vizaĝlibro") atingis 3500 la 31-an de marto. La paĝo estis kreita la 5-an de novembro 2009.

Kun 470 ŝatantoj Brazilo havas la unuan lokon en la laŭlanda statistiko. Aliaj pintaj landoj estas Usono (315), Francio (212), Pollando (160), Italio (157), Hispanio (143), Germanio (114), Meksiko (109), Argentino (103) kaj Rusio (88).

En Brazilo troviĝas ankaŭ la du urboj kun plej multe da ŝatantoj: San-Paŭlo (57) kaj Rio-de-Janeiro (55), sekvataj de Parizo (47), Hanojo (40), Budapeŝto (36), Bonaero (34), Santiago de Ĉilio kaj Varsovio (po 33), Seulo kaj Vilno (po 29), Moskvo (28), kaj Romo kaj Belo Horizonte (po 25).

71,2% de la ŝatantoj estas viroj kaj 27,3% virinoj, dum 1,5% ne anoncis sian sekson. Viroj do estas iom pli forte reprezentataj ol en la individua membraro, kie 66% estas viroj, 31% virinoj kaj 3% ne anoncis sian sekson.

Per sia Facebook-paĝo UEA atingis publikon, kiu estas multe pli juna ol la kotizanta membraro. Entute 40,5% de la ŝatantoj estas malpli ol 35-jaraj, dum inter la individuaj membroj ilia proporcio estas 7,3%.

UEA en Facebook: <https://www.facebook.com/Universala.Esperanto.Asocio>

*(Osma Buller. Gazetaraj Komunikoj de UEA. N-ro 494. 2013-04-03)*

# TAKSI LA NOMBRON DE E-PAROLANTOJ PER "FACEBOOK".

La nombro de Facebook uzantoj kiuj indikis ke ili parolas Esperanton estas 150,000! kontrolu mem:

<https://www.facebook.com/pages/Esperanto/112347282113529>

Se oni konsideras ke eble nur 1% - 10% de la homaro uzas Facebook, oni povas konkludi ke la nombro de Esperanto-parolantoj estas inter 1-10 milionoj (komprenble por scienca takso oni devas konsideri pliajn faktorojn kaj modifojn, sed kiel unua kruda takso ĝi ja povas esti komenco).

Cetere, Antaŭ unu semajno la nombro de ŝatantoj de "Esperanto" en Facebook estis 170,000 (ne 17,000 kiel mi mistajpis en la antaŭa mesaĝo). De tiam ĝi ŝajne kreskis je 10% kaj nun estas 188,000 ŝatantoj.

(Amri Wandel. 07/04/2013)

## Pri la sama afero ...

Amri evidente ne legis miajn du mesaĝojn pri tiu ĉi temo en la listo uea-membroj. Mi forte malkonsilas uzi la ciferojn, indikitajn de Amri, en la informado pri Esperanto. Jen mia unua mesaĝo en uea-membroj:  
> *La statistikoj de la paĝo, al kiu Amri resendis, kombinas la statistikojn de ĉiuj Facebook-paĝoj, kiuj rilatas al Esperanto. 150.000 homoj ne parolas Esperanton sed pli ĝuste pri Esperanto. Sama homo povas enkalkuliĝi multfoje.*

*Laŭ Facebook Ido havas 39000 "parolantojn", t.e. kvaronon de la nombro de Esperanto. Por semajnfina amuzo, jen la nombroj de kelkaj aliaj frataj lingvoj: Volapuko 6400, Interlingua 2700, Europanto 2500, Solresol 2100, Latino sine flexione 1400, Novial 580, Ro 400, Bolak 390, Glosa 240, Idiom Neutral 170, Interlingue 160.*

Jen la dua mesaĝo:

> *Ĉar mi administras la paĝon de UEA kaj iujn aliajn, mi devis konatiĝi kun la signifo de la terminoj de Facebook, kiuj ofte estas nebulaj kaj facile erarigaj kiel en tiu ĉi kazo. Kiam mi aperigas gazetarajn komunikojn pri la paĝo de UEA, mi mencias nur tiujn ciferojn, kiuj estas klaraj kaj neambiguaj. 150 mil Esperanto-parolantoj en Facebook estas fantaziaĵo. Kiel dirite, surbaze de samaj kriterioj estas 39000 "idistoj" en Facebook, kio kompreneble estas eĉ pli granda fantaziaĵo.*

*Mi tamen ne faris bone mian refuton, ĉar mi forgesis rigardi la nombron de la Fejsbukaj "parolantoj" de Klingon. Ĝi estas 240.000. Ĉu ni agnosku, ke Klingon venkis?*

(Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA. 08/04/2013)

**Memoru pri la TTT-ejo de nia E-Grupo: [esperantobilbao.tk](http://esperantobilbao.tk)**